


# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

decembro 2020



# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 27[3] numero 140 decembro 2020

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
**Redaktistoj:** Terry Manley, Andrew Woods
**Provlegantoj:** Vera Payne, Donald Rogers
**Kontaktadreso:** esk@esperanto.org.au

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

**Abonoj kaj pasintaj numeroj**
Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA). Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au
NZEA: www.esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

**Kiel kontribui al ESK**
Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au
**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**
15-a de februaro 2021

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2020 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.
ISSN 2207-0087

**Sur la kovrilo**
Lumturo ĉe Cape Otway, Viktorio
*(Pixabay, Reinhard C. Wieland)*

**Aliaj bildatribuoj**
p4 *Pixabay, Karolina Grabowska (kaboompics)* p5 *Nacia Galerio de Aŭstralio, 277617* p9 *Pixabay, bluewaterscottage10* p14 *ukiyo-e.org* p17 *Pixabay, TeeFarm*

# enhavo


04 Antaŭparolo
05 Kuraĝo en malfacilaj situacioj
06 Marŝado de Monto Royal ĝis Monto Allyn
09 Sovaĝuloj—sed foje nobluloj
10 La vivo de asocio
11 Rakonto pri du sistemoj
12 Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro 2021
14 Al la katamantoj
15 Ne manĝu kadavrojn!
18 Mia pasio: katedraloj
22 Monataj prelegoj rektelsende

# ANTAŬPAROLO


Pli kaj pli abundas la ebleco partopreni E-eventojn per la reto. Limigoj pri vojaĝado pro la kronviruso necesigis tiujn eventojn por daŭrigi agadon en Esperantujo. En aprilo, la 7-a IREK (Irana Esperanto-Kongreso) tre sukcese okazis rete, kun aliĝintoj de multaj landoj kaj prelegistoj altkvalitaj. Je la komenco de junio, AEA okazigis unutagan eventon pere de la reto. Kun elstaraj kontribuantoj de diversaj landoj kaj partoprenantoj de multaj ĝi estis sukcesa kaj ankaŭ provizis bonan ŝancon provi tiun rimedon.

Komence de aŭgusto okazis la UK de UEA—sed ĉifoje rete. Estis pli ol 1800 partoprenantoj kiuj ĝuis prelegojn, distraĵojn kaj babilĉambrojn. Kvankam oni sopirus sperti UK-on ĉelokan, la reta UK donis ŝancon al tiuj kiuj ne povus ĉeesti, sperti la eventon.

AEA organizas ĉiun monaton e-E-eventon (elektronikan Esperanto-eventon) pere de Zoom (“zum”). Dum pli ol du horoj estas du prelegoj kun postaj demandoj kaj diskutoj.

Per la sama metodo—tute Interrete—AEA okazigos la Kongreson kaj Kursaron de 2021 dum la venonta januaro. Teme de membroj de AEA aŭ NZEA, ĉi tiu evento estos senpaga; por ne-membroj, ni petas mondonacon, aŭ membriĝon.

TERRY MANLEY



# Kuraĝo en malfacilaj situacioj

## Charles Stevenson

Je la komenco de la Dua Mondmilito, en Anglio regis paniko. Do, en majo 1940 la registraro metis en mallibere-jon multajn Judojn, kiuj eskapis el nazia Germanio, kaj nomis ilin "malamikaj alina-cianoj."

La sekva paŝo de la angla registraro estis transŝipi tiujn judojn al Aŭstralio–2500 ĉefe junajn virojn. Estis terura vojaĝo en *Dunera*, ĉar la soldatoj, kiuj devis zorgi pri la transportatoj surŝipe estis veraj krimuloj–tiuj, de kiuj la brita armeo deziris liberiĝi.

Kelkajn jarojn poste surbaze de juĝista enketo oni enkarcerigis plurajn el la solda-toj. Milita tribunalo kondamnis iun kolo-nelon, kiu diris sur la ŝipo "Mi fermos la okulojn, se soldato ŝtelos viajn havaĵojn."

Intertempe, je la alveno en Sidnejo iu tagĵurnalo tekstis: "Alvenas rat-aspektaj homoj." Fakte ili estis intelektuloj. En Aŭs-tralio post la milito ili iĝis eminentuloj—en filozofio, matematiko, arkitekturo, muziko, arto kaj sporto. Kiam oni konstatis, ke ĉi tiuj malliberigitoj en Eŭropo kontraŭstaris naziis-mon, la registraro libe-rigis ilin.

Sed! Unue ili estis en puntenejo, precipe en Tatura, Viktorio. Kion fari dum la longaj tagoj? Ili organizis tea-traĵojn, orkestron, med-icinajn aferojn, kaj ling-vokursojn—inkluzive de Esperanto.

Profesoro Beck estis la estro de la Es-peranto-grupo. Oni ne scias pli pri li. Sed unu el la studentoj estis Otto Bennemann. Li mem komencis esperantajn klasojn. In-terese estas, ke lia edzino restis en Britio dum la milito, ne arestita. Post la milito Bennemann revenis al Brunsviko, Ger-manio, kie li iĝis urbestro, kaj poste min-istro pri internaj aferoj en la registraro de Malsupra Saksio. Li kaj la aliuloj diris: "Nia situacio estis malbona, certe, sed estis milito, ni estis nur unu malgranda grupo. Multaj homoj suferis pli malbone ol ni."

Ĉu iam okazis esperantaj lecionoj en Aŭstralio en sama situacio? Mi kredas ke ne–nur en agrablaj hejmoj, lernejoj, kaj kluboj. Malgraŭ tio, Esperanto certe kaptis diversajn interesajn homojn–eĉ en pun-tenejo.

Notu: Multaj libroj kaj artikoloj estis eldonitaj pri tiu temo. La ĉefa estas *Dunera Lives* de Ken Inglis. Sube estas gravuraĵo de Tatura farita de Ludwig Hirschfeld Mack en 1941.



# *Marŝado de Monto Royal* ("rojal") *ĝis Monto Allyn* ("alin")

## *Terry Manley*

Antaŭ jaro mi kaj grupo piediris tra arbaro dum tri tagoj gvidate de amiko Martin. Estis ok en la grupo, unu 14-jaraĝa (filo de Martin), kvar 25-jaruloj kaj la cetero en mia aĝgrupo de 60 plus. Ni iris de Monto Royal trans du valoj al Monto Allyn. Inter la valoj estas Monto Cabre Bald (pron. "kabre bold") kiun ni vizitis. Ni tendumis en la valoj apud riveroj. Foje la irado estis sur vojoj por fajrestingaj kamionoj, foje laŭ ne plu uzataj arbaristaj vojoj, kaj foje simple tra arbaro per mapo kaj kompaso.

La celo de iuj en la grupo estis reviziti lokon kiun ili vizitis antaŭ preskaŭ 40 jaroj. En la fruaj 1980-aj jaroj ili tendumis apud rivereto Boonabilla ("bunabila") ĉe ebenaĵo nomita Blu-eŭkalipta Ebenaĵo. Ĉifoje ili volis provi foti similajn lokojn kiujn ili fotis ĉe la tendumloko antaŭe. Rimarkinde estis ke en 2019 la arbaro estis multe pli densa kaj fakte estis malfacile identigi la lokojn de 1982.

Ĉijare Martin decidis refari la saman marŝadon kun grupo. Dum la pasinta somero estis arbarfajro en ĉi tiu regiono kiel en multaj aliaj partoj de la ŝtato New South Wales (Novsudkimrujo). Do la celo ĉifoje estis noti la rezulton de la fajro en la arbaro. Ĵaŭdon grupo de kvin ekmarŝis de la regiono de Monto Royal. La plano iom malsamis de tiu de la antaŭa jaro, ĉar alia grupo de kvin komencis je vendredo kaj renkontis la unuan grupon ĉe Blu-eŭkalipta Ebenaĵo. Kaj ĉifoje mankis tiu meza aĝgrupo. Nur estis ni nejunuloj kaj la filo de Martin, Samuel. Mi estis en la unua grupo.

Nia unua reago al la medio estis noti la ŝanĝon ĉe la komenca vojo de Young ("jang"). En 2019, ĝi estis mallarĝa vojeto kun arbustoj entrudantaj, sed nun estas kamionlarĝa vojo. Dum la fajroj la estingistoj plilarĝigis ĝin por faciligi iradon. Post ne longe ni rimarkis iujn spurojn de la fajro—nigrajn trunkojn, novkreskaĵojn surtrunkajn, kaj novajn plantidojn surgrundajn. La verdaj kaj ruĝaj koloroj brile kontrastis kontraŭ la cindra nigro.

Mia edzino kaj la edzino de alia el la grupo marŝis kun ni en la mateno, sed kiam ni alvenis al nia flankeniro ili reiris al la aŭtoj kiuj portis nin al la komencloko. Marŝante tra la arbaro oni ankaŭ rimarkis ties maldensiĝon. Oni pli facile marŝis, ne





barita de densa subkreskaĵo, kaj oni havis vidon al pli fora pejzaĝo por konstati la direkton irendan. Malgraŭ tio, estis neklare kiun montspinon ni sekvu al la valo. Fine post mallonga preteriro ni reiris al la ĝusta spino kaj malsupreniris. Sur la deklivo estis multe da nova grundkovraĵo planta. Plej multaj estis el la genro *Solanum*, plantoj parencaj al la tomata familio. Iuj indiĝenaj iuj ne.

Alveninte al la rivereto Boonabilla ni estis en tiel nomata praarbaro aŭ pluvarbaro —kaj jes iomete pluvis. La ombroj sub la arbaro ne estis tiel malhelaj kiel la antaŭan jaron pro la hazarda forigo de iuj arboj per la fajro. Bonŝance kiam fulmo komencis la fajron en ĉi tiu regiono, la kondiĉoj ne estis tiel minacantaj. La temperaturo ne tre altis kaj la vento ne tre fortis. Do estis interese ke iuj arboj tute forbruliĝis kaj, ne tre for, aliaj ne suferis ion ajn. Inter la fotoj estas unu kun mi ◄ malantaŭ restaĵo de arbo kiun termezuristoj uzis por marki la lokon antaŭ jarcento aŭ pli. Do fine ĝi malaperas. Ni laŭiris la rivereton kontraŭflue cele al nia tendumejo. Survoje ni rimarkis ke la fajro nur tuŝetis tiun grandegulon kiun ni vidis en la antaŭa jaro. Ĝi estas speco de strangolanta figo. Ege granda. Se oni rigardas al satelita mapo surreta oni facile rimarkas la figon. Martin staras antaŭ ĝi en unu el la fotoj. ▲

Pluvetis dumnokte ĉe nia tendumejo sed kun fajro kaj ŝirmo ni feliĉis. Je vendredo vespere la alia grupo aliĝis al ni do entute ni tiam estis dek. Sabaton ni reiris al loko laŭ la rivereto de kie ni grimpis montospinon orienten. Apud la rivero estis ripozejo de granda nombro da fruktvespertoj. Tie ili pendas de la arboj dumtage, foje dormante, ĝis en la vespero ili iras serĉi manĝon. Malgraŭ ties nomo ilia ĉefa manĝaĵo estas el floroj de la eŭkaliptoj. Ili plenumas gravan rolon portante polenon trans longaj distancoj dise tra la arbaroj.

Grimpinte la montospinon ni retrovis vojeton laŭ kiu ni iris al Monto Cabre Bald kie ni tagmanĝis. La montosupro estis en la nuboj, do ni ne ĝuis la panoramon foran, sed estis alia mondo inter la arego da ksantoreoj *(Xanthorrhoea)*. Iel mi sentis ke mi estas inter tribo de prauloj. Tribo kun al-



taj plenkreskuloj, infanoj kaj beboj. ▲ Mi povas imagi kiel ĉi tiu planto gajnis nomon ne plu akcepteblan—*nigrulo*. La fajro nigrigis la trunkojn kaj instigis floradon de altaj spikoj. ▼ La preferata komuna nomo nun estas *gresarbo*.

Ni malsupreniris al rivero Patterson kie ni tendumis. En la mateno la grupo refoje disiĝis: iuj frue reirantaj al sia aŭto ĉe la komencloko, kaj mi kaj aliaj suprenirantaj al renkontiĝejo sur Monto Allyn.

Meze de ĉi tiu vojaĝo sur la spino inter la riveroj estas limo inter nacia parko kaj ŝtata arbaro por la rikolto de arboj. Oni ne multe rikoltas en la pasintaj jardekoj kaj la vojoj de la arbaristoj malaperas sub kreskaĵoj. Martin kaj aliaj nun klopodas inkluzivigi tiun arbaron en la nacian parkon por protekti ĝin estontece.



# Sovaĝuloj—sed foje nobluloj

## Trevor Steele



El la vidpunkto de la aborigenoj de Aŭstralio la komenco de brita setlado (fakte en formo de gulago por malliberuloj forsenditaj el Britio) estis ankaŭ la komenco de katastrofa detruado de vivmaniero kun multjarmila historio. La britoj de tiu tempo absolute ne agnoskis, ke la aborigenoj rajtas posedi sian teron. La indiĝenoj estis ja primitivuloj, kiuj devis cedi sian lokon al la supera eŭropa kulturo.

Tiu sinteno pri la aborigenoj estis preskaŭ universala inter britoj. Parta escepto estis Watkin Tench ("Ŭotkin Tenĉ"), malaltranga oficiro de la mararmeo. Li estis akuta observanto de multaj aspektoj de la punkolonio, kaj liaj rakontoj estas nia plej leginda kroniko de la fruaj jaroj.

Tench estis lojala monarĥisto, kaj neniam dubis, ke la britoj rajtas establi sian kolonion. Ke eŭropa civilizacio kaj kristanismo estas superaj al ĉiaj eblaj rivaloj, li ne dubis. Samtempe li kiel esceptulo aprecis la inteligenton kaj talenton de la aborigenoj. La suba teksto estas elĉerpaĵo el lia verkaro: *Rakonto pri la Ekspedicio al Botani-Golfo* kaj *Kompleta Kroniko pri la Setlejo ĉe Haveno Jackson* (*A Narrative of the Expedition to Botany Bay* kaj *A Complete Account of the Settlement at Port Jackson*) de 1789 kaj 1793.

"Nia vojaĝanta amiko Boladeree... proksimume je tiu tempo ofendis en maniero, kiu devigis nian atenton. Li priĵetis per lanco malliberulon en arbaro, kaj vundis lin. La vero estis, ke iu malica homo el nia blankula grupo fiintence detruis lian kanuon, kaj li venĝis tiun atakon je la unua senarmila homo nia renkontita. Nun ŝajne li rigardis la aferon ĝustigita; kaj probable tia estas la kutimo, kiun ili havas en sia socio en similaj kazoj. Sed eksciinte, ke ordono estas anoncita, ke oni kaptu lin aŭ, se tio ne estos plenumebla, ke oni pafu lin, li prudente ĉesigis ĉian kontakton kun ni kaj ne estis vidita dum longa tempo.

"Tamen, se foje ili vundis nin, por kompensi ili ofte estis altagrade komplezemaj al tiuj, kiuj bezonis ilian helpon. Du ekzemploj de tio okazis antaŭ nelonge. Boato renversiĝis sur la haveno. Baneelon[1] kaj kelkaj aliaj indiĝenoj, kiuj vidis la akcidenton, tuj enplonĝis kaj savis ĉiujn personojn. Kiam ili surbordigis ilin, ili malvestis ilin, ekbruligis fajron kaj sekigis iliajn vestojn, donis al ili fiŝojn por manĝi, kaj gvidis ilin al Sidnejo.

"La alia ekzemplo temis pri soldato vojerarinta en arbaro, kiam li renkontis grupon de indiĝenoj. Li komence ne sciis ĉu fuĝi aŭ peti ilian helpon. Vidinte inter ili iun konaton, li decidis komuniki sian mizeran staton al li kaj fidi je lia malavareco. La indiano[2] diris al li, ke li vagis longan distancon for de sia hejmo, sed ke li kondukos lin tien, kun la sola kondiĉo, ke li transdonu al li la fusilon en siaj manoj; li promesis porti ĝin por li kaj redoni, kiam ili poste apartiĝos. La soldato malemis fordoni sian armilon; tiel li metos sin tute en ilian potencon. Sed ĉar li ne vidis alternativon, li fine konsentis. Sekve la tuta grupo surterigis siajn lancojn kaj fidele eskortis lin al la plej proksima parto de la setlejo. Tie ili redonis la fusilon kaj foriris, ne petinte kaj laŭŝajne eĉ ne atendinte ian repagon."

1. Nuntempe oni skribas *Bennelong*.
2. Tiutempe oni ofte uzis tiun terminon pri la indiĝenoj de Aŭstralio.

# La vivo de asocio

Franciska Toubale


Asocio estas renkontejo de homoj kun sama intereso. Sed ĉu komuna intereso sufiĉas por ke homoj pensu kaj agu simile? Kiam homoj havas la saman celon, malofte ili konsentas pri la maniero atingi tiun celon.

En familio, aparte kiam gefratoj devas dividi la samajn objektojn, lokojn, la infanoj frue lernas ke ne ĉiu el iliaj deziroj estos plenumitaj, ke ne ĉiuj el iliaj ideoj estos akceptitaj de la aliaj membroj de la familio. Oftaj diskutoj kaj kompromisoj garantias bonan etoson kaj ĉies kontenton.

Je kreado de asocio la membroj decidas pri la statuto, kiu regos ĝian vivon. Ja ekzistas modelaj statutoj, rezulto de multjara sperto kaj saĝo por helpi la novulojn. Sed la homa psiko estas tia ke de tempo al tempo, ĝi "endanĝerigas" la asocion, kaj homoj provas uzi la asocion por eksterigi sian deziron pri povo. Se la asocio bone funkcias, tiu individuo ne sukcesas ŝanĝi la sanajn rilatojn inter la membroj, kaj rapide malaperas. Ĝuste kiam Kep Enderby estis prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Aosocio, iu tia persono provis kontraŭstatute akiri pli da voĉdonoj ol li rajtis por certigi ke la rezulto de la baloto lin favoros. Post kelkaj minutoj revenis la sereneco, ĉar la provanton Kep—kun rideto sed firme—memorigis pri la statuto de la asocio kaj asertis ke neniu pretas subteni malsekvon de tiu statuto.

Sed se estas jam malforteco en la asocio, la provanto verŝajne sukcesos. Li estos konsiderata kiel la bone alveninta savanto kaj facile detruos la asocion—ne nur per prifajfado pri la satuto, sed pro deziro ŝanĝi ĝin favore al si.

Kompreneble ankaŭ tio okazis en la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Tio estas neevitebla. Nun ni konsideru ke tia estas la historio de la asocio. Post la sekretaj traktadoj—(ekzemple simpla letero al iu "ĝenulo" por malmembrigi lin/ŝin, eĉ sen spuroj en la arkivoj, ĉar tiuj homoj estas sufiĉe lertaj por ne konatigi siajn agojn)— sekvas granda laboro, por rekonstrui la fidon de la membroj al la estraro kaj de la membroj al la aliaj membroj, por revigligi entuziasmon post la elreviĝo kaj la emon partopreni pozitivan evoluon de la asocio. Pro tio mi ŝatus ĉi tie gratuli la nunan estraron de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kiu unuanime kondamnas la mankon de proceduro elektita de alia estraro antaŭ dek jaroj kaj sciigas tion al la tuta membraro, por ke ĉiu estu certa ke la ŝtormo ja jam pasis.



# Rakonto pri du sistemoj (Parto Unua)

## Igor Mosin tradukite de Marumi Smith

Kvankam mi venis el Moskvo kaj nun loĝas kaj ŝatas kultivi mian botanikan ĝardenon en Italujo. Mi naskiĝis en 1971 en Kirghis, Soveta Socialisma Respubliko. Mi estis impresebla junulo de dudek jaroj kiam la Sovetunio kolapsis.

Mia avo laboris en la karbominejo en Kirghizio. Li servis en la sovetia militarmeo sub Andrei A. Vlassov, la generalo (ĉef-komandanto) kiu poste aliancigis sian rusiajn soldatojn kun Germanujo por kontraŭbatali Stalinismon. Li estis kaptita kiam lia divizio kapitulacis al la Germanoj dum la invado de 1941. Post sukcesa eskapo al Rusio, Avo estis arestita kaj sendita al la trudlaborejo en Siberio. Post lia liberiĝo, li decidis iri al Kirghizio, kie estis rapida ekspansio de minado de karbo, plumbo, zinko-erco, sulfuro, hidrargo, kaj kie la salajroj estis altaj. Strange, Avo ŝajne forgesis sian arestiĝon kaj devigitan laboron, kaj memoris Stalinon kiel bonan homon ĉar li malaltigis la prezon de pano.

Mia patro, Alexander Mosin, estis ido de la inventinto de la Mosin-pafiloj kiuj estis vaste uzitaj dum la unua mondmilito (samvaste kiel la Kalaŝnikov-pafiloj de pli modernaj tempoj). Li laboris en Moskvo, kaj mi je tre juna aĝo devis studi ĉe normala lernejo. Superis mi en matematiko, kaj mi avide legis librojn de Jules Verne kaj H. G. Wells, *Kon-tiki* de Thor Heyerdahl, rusajn fabelojn, kaj seriozajn sciencajn fikciojn. Kiam mi atingis dek ok jarojn, mi sentis min plena je potenco ĉar mi estis nomita *komsorg* aŭ estro kaj povis organizi kursojn por junuloj (kiel skulpti lignajn tenilojn por iloj ekzemple), kaj ankaŭ enspezi monrimedojn por aĉeti koloran televidilon por la lernejo. Poste mi estis konskripciita en la Sovetian Armeon por du jaroj da militservo kiel radioteknikisto, distinginte min mem en kurso por telegrafaj telefonistoj dum mia lasta jaro de studoj.

Post plenumo de mia servo en majo 1991, mi revenis al la registare pagata duĉambra apartamento de miaj gepatroj en Moskvo. Mi loĝis tie kun la daŭra problemo pri spaco dum ni atendis asignon al pli granda apartamento. Estis ebleco aĉeti kooperativan apartamenton laŭ la transdona registara plano kontraŭ 8000 rubloj, sed kiu povus pagi tiom? Mia estonta edzino, Ramila, kiu loĝis en du spacomankaj ĉambroj kun sia fratino kaj ilia vidviĝinta patro, jam akiris krediton je la centra banko por duono de la sumo necesa al la kooperativo. La alia duona sumo falis el la ĉielo: Ramila serendipe translokiĝis al la pli granda apartamento kontraŭ paro da bonegaj italaj ledaj botoj dum la fifama “500 tagoj” da privatigoj, sed tio estas alia rakonto! Hodiaŭ estas tiuj, kiuj vendas apartamentojn por aĉeti provizon de vodko.

Venis la tempo por mi daŭrigi miajn studojn. Mi decidis fariĝi iktiologo (fiŝsciencisto), probable influita de la heroaĵoj de Jacques-Yves Cousteau. Mi provis registriĝi en la sekcio de biologio de la universitato, kie nur unu el dudek kandidatoj estis akceptitaj, sed malsukcesis la enirekzamenon. Ĝi estis ekzameno en supera matematiko kiu neniam estis instruita al ni en mia lernejo. Anstataŭe mi trovis laboron dum la somero kiel instruisto/gvidisto en pionira tendaro ekster Moskvo. La sovetia sistemo bone provizis por junuloj. Ili ricevis edukadon, kompletan medicinan atenton, kaj eĉ viandon por manĝi.

Ĉio aspektis pli kaj pli senesperiga ekde 1990. La financoj de la Kremlin ekfunkciis freneze, kiam mondaj petroloprezoj falis en 1986 de ĉirkaŭ tridek ĝis malpli ol dek dolaroj por barelo. La registaro devis pruntepreni multegon por importi manĝaĵon. La industria disvolviĝo malpliiĝis, kaj la ekonomia krizo pligrandiĝis. La registaro de Gorbacev falis pro ekonomiaj, ne politikaj kialoj.

*(daŭrigota)*

# Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kun Somerkursaro

## 9–13 januaro 2021

Ĉiu tago estos disigita en 4 programajn sekciojn
(laŭ Orienta Aŭstralia Somer-Tempo, UTC+11):
1: 11:00–13:00
(Tagmanĝo, kun interreta babilado: 13:00–14:00)
2: 14:00–15:30
(Kafopaŭzo, kun interreta babilado: 15:30–16:00)
3: 16:00–18:00
(Vespermanĝo, kun interreta babilado: 18:00–19:00)
4: 19:00–21:00

- Klasoj de Esperanto je tri niveloj
- Prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj
- Babilado, ridado, kaj feliĉo
- Jarkunvenoj de kluboj
- Konatiĝo, amikiĝo, kaj planado

### Kiel ĝi funkcios

La preciza miksaĵo de teknologioj estas decidota, sed verŝajne inkluzivos Zoom aŭ Jitsi (kiel uzita en Virtuala Kongreso de UEA) kaj/aŭ YouTube.

Unu interesa ideo estas, ke lokaj grupoj organizu ĉeestajn kunvenojn, kie ili povas kune partopreni, almenaŭ dum parto de la kongreso.

### Kotizoj

Membroj de AEA aŭ NZEA: Senpaga (tamen bonvole serioze konsideru kontribui per serioza mondonaco)
Ne-membroj: Pagu tion, kion vi povas, aŭ membriĝu al AEA kaj partoprenu senpage.

# Australia and New Zealand Congress and Summerschool

## 9–13 January 2021

Each day will be divided into 4 programmed sections
(Eastern Summer Time, UTC+11):
1: 11am–1pm
(Lunch, with online chat: 1pm–2pm)
2: 2pm–3:30pm
(Coffee break, with online chat: 3:30–4pm)
3: 4pm–6pm
(Dinner, with online chat: 6pm–7pm)
4: 7pm – 9pm

- Esperanto classes in three levels
- Lectures on Esperanto and other topics
- Conversation, laughter and joy
- Annual general meetings
- Making new friends and plans

How it will work
The exact technology mix is yet to be decided but it will probably include Zoom or Jitsi (as used in UEA's recent Virtual Congress) and/or YouTube.

One interesting idea is for local groups to organise physical meetings where they can participate collectively, at least for part of the congress.

Fees
Members of AEA or NZEA: Free (however please seriously consider contributing with a "serious" donation)
Non-members: Pay what you can afford, or join AEA and participate for free.

# Al la katamantoj...

Franciska Toubale

Ĉu vi estas unu el tiuj, kiuj posedas katon kaj ŝatas senti la dolĉecon de ĝia felo kontraŭ via gambo, la varmecon de ĝia korpo sur viaj genuoj dum vi rigardas la televidilon? Kato certe helpas sian prizorganton malstreĉiĝi, sed ĉu vi konscias ke ĝi estas la plej danĝera besto por la aŭstralia faŭno?

Malfacilas precize kalkuli kiom da bestoj estas mortigitaj de katoj ĉiun jaron, aparte de sovaĝaj katoj, ĉar ilia denseco varias laŭ la regionoj. Tamen oni taksas ke dorlotbestoj kaj sovaĝaj katoj kune mortigas ĝis tri miliardoj da bestoj en unu jaro. Ĉiu kato povas mortigi ĝis 186 bestojn jare. Ili minacas 81 malfortajn kaj 30 endanĝerigitajn speciojn de indiĝenaj mamuloj, 7 speciojn de rampuloj, 3 speciojn de amfibioj kaj 35 speciojn de birdoj. Sinjoro Fleming, kiu studis sovaĝajn katojn, iam trovis kvardek ĝis kvindek ranojn en la stomako de unu kato. 34 specioj de indiĝenaj mamuloj malaperis en la lastaj du cent jaroj... ne nur pro la katoj. Ankaŭ la forhakado de la arbaroj ludis rolon en tiu malapero.

Kial la ĉeesto de katoj kaŭzas tiom da damaĝo al la aŭstralia faŭno? Ilia alveno sur la insulo estas relative nova. Je 1850 ili certe estis jam establitaj. Probable la unuaj katoj alvenis eĉ pli frue, en la deksepa jarcento, pro la ŝippereoj de nederlandaj esploristoj. Sed daŭre la indiĝenaj bestoj ne perceptas katojn kiel predantojn, nek identigas la odoron de katoj.

Do la homoj, kiuj kreis tiun situacion per importado de katoj sur la insulon, devas nepre trovi solvon. La parlamento kreis komisionon, kiun la parlamentano Ted O'Brian prezidas, por enketi kaj decidi kiel interveni cele pereigi la katojn. La programoj varias de metado de venenigitaj allogaĵoj ĝis la uzado de flugantaj maŝinoj *(drones)* kiel okazas nun sur Kanguruo-insulo. Pro la fajro multaj indiĝenaj bestoj pereis, kaj urĝas protekti kiel eble plej grandan nombron de la travivintaj bestoj.

Ne ĉagreniĝu, tio ne signifas ke vi devas disigi vin de via kara amiko, kondiĉe ke vi strikte respektu kelkajn regulojn: neniam lasu vian katon iri ekster la domon, speciale dum la nokto. Profesoro Kris Dickman el la Universitato de Sidnejo, kiu luktas por konservi la indiĝenajn flaŭron kaj faŭnon de Aŭstralio kaj tamen mem posedas katon, asertas ke tiuj bestoj bone adaptiĝas al tiuj kondiĉoj kaj eĉ vivas pli longe. Mi ŝatus ke la endomiĝo pro la nova kronviruso havu la saman efikon al ni, homoj.

*Birdoj, kato kaj hundo*
Pentraĵo de Itō Jakuchū (伊藤 若冲, 1716–1800)



# *Ne manĝu kadavrojn!*

## *konsilas Bob Felby*

Unue, oni povus kredi, ke mi estas freneza skribi, "Ne manĝu kadavrojn", sed bonvolu ne tion kredi. Mi ne estas freneza, mi volas nur la plej bonan por vi, mi ne volas ke vi fariĝu malsanaj. Sed ne nur vian sanon mi deziras, mi deziras ankaŭ vivon sanan kaj feliĉan al ĉiuj niaj gefratoj; ankaŭ ĉiuj bestoj estas niaj gefratoj, ĉar ni ĉiuj havas ja la saman Patron, ĉu ne? kaj ni ĉiuj dividas la lokon sur tiu ĉi planedo, kiu facile povus esti bonega hejmo por ĉiuj el ni!

Mi certas, ke se vi scius tion, kion mi scias, tiam vi kompreneble ne bezonus legi ĉi tion, sed rigardante la mondon hodiaŭan, mi certas, ke mi scias ion, kion vi ne scias. Ek de la komenco de la tempo, Tiu, kiu kreis tiun ĉi planedon, diris treege klare por ke neniu miskomprenu, ke neniu el ni rajtas mortigi. Mortigo estas krimo, kiu tute ne plaĉas al Tiu, kiu kreis nin antaŭ tiom longe. Kio, laŭ vi, okazos al mortiginto? Nu, kompreneble li, aŭ ŝi, devas lerni ke li, aŭ ŝi laŭ la leĝo krimis. Tio validas ne nur por ordinaraj kaj honestaj homoj, sed certe ankaŭ por tiuj materialistoj, kiuj kredas pri si mem, ke ili regas la honestajn homojn loĝantajn sur la Tero!

Ankaŭ multaj bestoj manĝas kadavrojn, sed ili estas bestoj, ne homoj. Iom post iom ankaŭ ili fariĝos homoj, sed se ili ĉesus en la kadavromanĝado ili iom pli baldaŭe atingus la homan formon: tio estas, ili vivos en la homa formo, sed ankoraŭ ne kondutas kiel homoj. Vi kaj mi scias, ke vivas multaj bestoj en la homa formo, ĉu ne?

Tiu, kiu kreis nin ĉiujn, unue kreis nin kiel la plej primitivaj estuloj. Ne estis multo sur la Tero, do ne estis facile vivi ĉi tie. Tiam ni, ĉar ni ja komencis nian vivon ĉi tie kiel ĉiuj aliaj, manĝis kaj trinkis ĉion, kion ni povis trovi.

Mi ne memoras kiom longe ni vivis tiel, sed iom post iom ni ricevis pli komplikan materian korpon, kaj tiel nia vivo iom ŝanĝiĝis. Ni vivis multegajn fojojn en la samaj specoj de korpoj, sed, kiam nia komuna Patro vidis, ke nun ni ne plu ion ajn lernas en tiuj korpoj, ni enkarniĝis en aliajn iom pli komplikajn korpojn. Tiel ni lernis, iom post iom, la regulojn de la vivo. Nun ni estas en la homa korpo, sed tio neniel signifas, ke ni estas homoj. Homoj estas la plej evoluintaj kreitoj sur la Tero. Kompreneble troviĝas ja ankaŭ multe pli evoluintaj homoj, sed bedaŭrinde ne sur nia planedo, la Tero. Ni devas atendi, ĝis ankaŭ ni meritos vivadi tute alian kaj multe pli bonan vivon. Tiam ni reenkarniĝos sur alian pli altan planedon, sur kiu neniu torturas, turmentas, mortigas kaj manĝas siajn etajn gefratojn.

Jam en la komenco, fakte en Genezo 1:29 de la Sankta Biblio oni povas legi: "Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon. Tio estu por vi manĝaĵo." En Genezo 1:30 ni povas legi: "Kaj al ĉiuj bestoj de la Tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampuloj sur al Tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel."

Se vi ankoraŭ, kun ĝojo, manĝas la mortintan karnon de niaj belaj bestoj,

sciu, ke karnovorulo havas ungegojn, neniujn porojn, kaj ŝvitas tra la lango; havas akrajn antaŭdentojn por ŝirado; ne havas platajn molarojn por muelado. Ĝi havas intestojn trioble pli longajn ol la korpo por ke la rapide putranta viando ne kaŭzu kanceron, sed estu eliminita kiel eble plej rapide, kaj fortan kloridacidon en la stomako por digesti la viandon.

Herbovorulo ne havas ungegojn: ĝi ŝvitas tra poroj, kaj ne havas akrajn antaŭdentojn, sed platajn malantaŭajn molarojn. Ĝiaj intestoj estas 10–12-oble pli longaj ol la korpo. Ĝia stomakacido estas 20-oble malpli forta ol tiu de la karnovoruloj.

Homo ne havas ungegojn: li, aŭ ŝi, ŝvitas tra poroj en la haŭto. Li ne havas akrajn antaŭdentojn, sed platajn malantaŭajn molarojn. Liaj intestoj estas 12-oble pli longaj ol la korpo, do la putranta karno en lia, aŭ ŝia, stomako, povas pli facile kaŭzi kanceron, sed nur se lia, aŭ ŝia, manĝitaĵo estas karna. Lia stomakacido estas 20-oble malpli forta ol tiu de la karnovoruloj.

Nu, kiu donis al la homo la malĝustan ideon, ke li, aŭ ŝi, rajtas kapti kaj kruele mortigi sendefendan beston, kaj manĝi ĝian kadavron? Ŝajnas al mi ke nur kanibaloj kondutas tiom malbone. Homoj ne mortigas, ili helpas, ne nur unu la aliajn, sed ankaŭ siajn gefratojn, la bestojn! Homoj kiuj malobeas nian Patron, sendube lernis tion de la diablo, kies nomo estas Satano. En Danujo la plej multaj homoj malamas la nomon Satano, ili do ŝanĝis ĝin al Søren!

En Genezo 9:4–8 estas skribite: “Nur karnon kune kun ĝia animo, la sango, ne manĝu. Ankaŭ vian sangon kaj animon Mi repostulos, el la manoj de ĉiuj bestoj Mi ĝin repostulos, el la manoj de homo, el la mano de ĉiu homo pro lia frato aŭ fratino, mi repostulos la animon de homo. Se iu verŝos sangon de homo, ankaŭ lia sango estos verŝita de homo; ĉar laŭ la bildo de Dio estas farita la homo.”

Homoj ne manĝas karnon; karno apartenas al niaj multaj gefratoj vivantaj sur la Tero. Mi certas ke Dio, nia Patro, ne ŝatas, ke ni kruele elkarnigas Liajn milionojn da gefiloj (do, niaj gefratoj), kaj, kvazaŭ ni estus vampiroj, voras ilin! La plej bona maniero por instrui al iu ajn, estas igi lin, aŭ ŝin, mem suferi tion, kion ni igis niajn gefratojn suferi. Do, kiam ni elkarniĝos ni estos enkarniĝitaj en iun el tiuj specoj de korpoj, al kiu ni tiom longe kaŭzis timon kaj teruron. Ankaŭ ni devas lerni timi kaj suferi, ĉar ni ja tiom longe ĝuis, eĉ ĝuegis, fari tion al aliaj!

Tiom pri kruelaĵoj al bestoj, ĉu ne? Sed tio ne sufiĉas al iuj el ni. Iuj el ni havas kiel ŝatokupon mortigon de tiuj el ni, kiuj jam havas la homan korpon. Se iuj homoj parolas alian lingvon ol ni, se ili loĝas en alia lando ol ni, se ili havas alian religion ol ni, se estas oleo en alia lando ol en nia, tiam tiuj tiel nomataj homoj, kun ĝojego sendas preskaŭ senkulpajn gejunulojn al tiu alia lando por detrui ĝin. Tie ili detruas kiom eble plej multajn konstruaĵojn, hotelojn, malsanulejojn, lernejojn, fabrikojn, palacojn ktp. Sed tiuj homoj, kiuj kruele devigis la preskaŭ senkulpajn gejunulojn marŝi al alia lando por agi kiel vampiroj, mem restas hejme ne laborante, nur manĝante kaj dormante, manĝante kadavrojn kaj fumante fetorantajn cigarojn. Sendube ili opinias, ke ili estas tute senkulpaj, ĉar, laŭ ilia propra opinio, ili ja mortigis neniun! Sed la Unusola Juĝisto de la Universo scias ion alian, kaj Li estas justa! Kaj alia danĝero al tiuj, kiuj komandas la preskaŭ senkulpajn

gejunulojn eliri al fremda lando por trovi sian morton tie, estas ja, ke nia Komuna Patro (ĉar ni ĉiuj estas ja gefratoj, ĉu ne?) ne nur malŝatas la manĝadon de karno, sed Li malŝatas ankaŭ la fetoron de fumo,  do, mi rekomendas al vi ĉiuj, ĉesigu kiom eble plej baldaŭ, vian fumadon! Mi, kaj sendube multaj kun mi jam komencas kredi, ke mi nun scias la kialon de la koronaviruso, kiu jam nun  minacas la daŭrigon de vivo homa kaj besta sur tiu ĉi iam belega kaj priloĝinda planedo.

En Jesaja 1:11 Dio klare diras: "Por kio Mi bezonas vian multegon da bruloferoj? Mi trosatiĝis de la bruloferoj de ŝafoj kaj de la sebo de grasigitaj brutoj, kaj la sangon de bovoj kaj ŝafidoj kaj kaproj Mi ne deziras."

Mi do komprenas tion tiel, ke ni ne plu bezonas bruligi incenson en niaj preĝejoj kaj certe ne bezonas mortigi ŝafidojn kaj bruligi ilin sur la altaro en niaj sinagogoj! Cetere, "altaro" signifas, en la hebrea lingvo "buĉejo"! Eble valorus pensi ankaŭ pri tio de tempo al tempo!

Kaj kio pri la multaj religioj de la mondo. Ĉu ili agas por tutmonda paco? Se jes, kial do kunmarŝas tiom da pastroj kune kun la gesoldatoj al fremdaj landoj. La celo de tiu fimarŝadaĉo estas ja detruadi kiom eble plej multe da konstruaĵoj kaj mortigi kiom eble plej multe da homoj kaj bestoj, ĉu ne? Kial tiuj pastroj ne levas siajn voĉojn kaj admonas la tro multajn sangavidulojn ke tio, kion la mondo bezonas kaj deziras, estas tutmonda kaj daŭra paco! Kompreneble por ke tio realiĝu oni sendube bezonas Universalan Lingvon, kaj ĝin nia admirinda Lazaro, Ludoviko Zamenhof ja jam donacis al la mondo. Kial la tiel nomataj regantoj ne akceptas ĝin? Ĉu ili vivas malantaŭ sia tempo?





Katedralo de Reims en Francio: ĉi tie francaj reĝoj kroniĝis. Tio montras la povon de la mezepoka eklezio: episkopoj en la nomo de Dio kronis reĝojn.

# Mia pasio: Katedraloj

## David Ryan

Mi konfesas ke mi havas strangan pasion. Kiel multaj novzelandanoj, mi interesiĝas pri rugbeo, sed mia vera intereso estas katedraloj tra la mondo. Kiam ajn ni vojaĝas kiel familio, mi ŝatas viziti katedralojn kaj aliajn preĝejojn. Tio plaĉas ankaŭ al mia edzino, sed miaj filinoj malpacienciĝas kaj ili preferas butikumi.

Mi ŝatas viziti katedralojn pro la sekvaj kialoj.

- Katedraloj estas domoj de Dio. Tie mi povas preĝi kaj paroli kun Dio.
- En katedraloj ni vidas ekzemplojn de bela arto kaj arkitekturo.
- Katedraloj estas historiaj lokoj. Ofte oni trovas tombojn de reĝoj, episkopoj, aŭ aliaj famaj homoj.
- Katedraloj ofte estas simboloj de urbo aŭ lando. Kiam Notre Dame en Parizo brulis pasintan jaron, la franca registaro tuj sciigis ke oni rekonstruos ĝin. Sendube, Notre Dame estas la simbolo de Parizo, eble eĉ de la tuta Francio. Kiam la katedralo en la urbcentro de Christchurch duone detruiĝis en la tertremo de 2011, okazis granda debato. Unuflanke, oni diris ke nova, modernstila katedralo pli taŭgos (aŭ eĉ parko anstataŭ religia konstruaĵo!). Aliflanke, oni diris ke la katedralo estas la plej konata kaj amata simbolo je la koro de Christchurch. Finfine, oni decidis rekonstrui la katedralon laŭ ĝia antaŭ-tertrema stilo.
- Kiel turisto, oni povas viziti katedralon ĝenerale senpage.

La famaj grandaj katedraloj kiujn ni vidas nuntempe en Eŭropo konstruiĝis dum la meza epoko, plejparte inter la 13-a de 16-a jarcento. En tiu tempo la katolika eklezio, ĉefe en landoj kiel Anglio, Francio, kaj Hispanio, estis tre riĉa kaj havis grandan influon en socio kaj politikan povon. Ofte okazis konfliktoj inter reĝoj kaj religiestroj. Ekzemple, kiam la Reĝo Henriko II-a koleriĝis pro la ĉefepiskopo Thomas Beckett pri la rajtoj kaj privilegioj de la katolika eklezio, kavaliroj de la Reĝo mortigis lin en la katedralo de Canterbury. Tio okazis kontraŭ la volo de la Reĝo kaj li faris publikan penton kaj petis pardonon pro la murdo de Thomas Beckett. Ĉu nuntempa reĝo aŭ naciestro farus simile? Tute ne!

En la centro de multaj mezepokaj urboj ofte staris granda katedralo kaj en la placo antaŭ la katedralo komercistoj vendis siajn varojn al enloĝantoj kaj

vizitantaj pilgrimantoj. Altaj katedralaj turoj montris la vojon al vojaĝantoj kiuj vagis iom perditaj en la kamparo, sen helpo de mapoj. Imagu kiam vizitanto alvenis al granda katedralo, ofte la plej granda kaj alta konstruaĵo en la regiono. Sunlumo eniris per altaj koloraj vitraloj, oni povis vidi ostojn de iu sanktulo, ĥoroj kantis kaj sacerdotoj parolis per stranga lingvo (latina), kaj incenso invadis la nazon. Certe la vizitanto sentis grandan dioplenan emocion, ĉu ne? Ankaŭ mirinde, kiel oni sukcesis konstrui tiel grandajn konstruaĵojn sen maŝinoj aŭ elektropovo? Mi miras pro la lerteco de la tiamaj arkitektoj kaj masonistoj. Certe konstruado daŭris dum pluraj jardekoj kaj okazis multaj akcidentoj. Tamen, katedraloj kiuj konstruiĝis antaŭ preskaŭ 1000 jaroj ankoraŭ staras en relative bona stato.

Do, ĉu grandaj katedraloj havas estontecon? Nuntempe oni ne plu konstruas grandajn katedralojn ĉar la prezo estas ege alta kaj, bedaŭrinde, ne estas tiom da homoj kiuj regule vizitas preĝejon. Tamen, milionoj da turistoj ankoraŭ vizitas katedralojn. La nuna problemo estas kiel akiri monon por altkosta bontenado kaj riparado. Katedralaj butikoj vendas librojn, kalendarojn, kaj aliajn memoraĵon. Tamen, ĉu peti monon el tiuj kiuj volas eniri la domon de Dio?

*Sube:* La altaj turoj de la katedralo de Chartres en Francio estas videblaj elde la fora kamparo. ***Kontraŭpaĝe:*** Mirinda arkitekturo en la katedralo de Wells en Anglio.






# Monataj prelegoj

## surrete kaj rektelsende

La AEA ekde julio 2020 organizas serion da prelegoj, prezentitaj rekte per Zoom, po du je la **tria dimanĉo de ĉiu kalendara monato**. Tiuj jam okazintaj troveblas en nia Jutuba kanalo, *Esperanto Australia*.

Por spekti, aŭ por mem prezenti prelegon, sendu peton al `prezidanto@esperanto.org.au` kaj vi ricevos ligilon je la hieraŭo de la evento. La kiamo estas 4–6ptm laŭ Sidnejaj horloĝoj (UTC+10, aŭ UTC+11 ekde oktobro).

**19 julio 2020**
"*Monato* – 40 jaroj": La historio de la mondfama Esperanta revuo – Paŭl Peeraerts (Belgio)
La ĉefaj socioscienca j kialoj kaj efikoj de KOVIM-19, kaj kiel Hungario sukcesis trakti la epidemion — D-ro Márkus Gábor (Hungario)
**16 aŭgusto 2020**
Historiaj pandemioj kaj la sekvoj — Trevor Steele (Aŭstralio)
La historio de Kenwood House, en norda Londono — Anna Löwenstein (Britio)
**20 septembro 2020**
Mia vivo kiel Esperantisto — Carlo Minnaja (Italio)
Asocio de Verduloj Esperantistoj — Manfred Westermayer (Germanio)
**18 oktobro 2020**
MAS (Monda Asembleo Socia) — Eddy Raats (Belgio)
KER ekzamenoj — Szabolcs Szilva (Hungario/Pollando)
**15 novembro 2020**
Eldonejo Lorenz: 45 jaroj — Alvaro Motta (Brazilo)
La filipina lingvo: krizo pri identeco? — Albert Stalin Garrido (Filipinoj)
**20 decembro 2020**
ACM: Afrika Centro Mondcivitana – François Hounsounou (Benino)
Iniciato Komunikadmasko – Rainer Kurz (Germanio)
Anoncote per nia retejo, `aea.esperanto.org.au/news`





Nia kanalo atingeblas per:
`https://bit.ly/33EQAAX`

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

**Committee Members:**
Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1150
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Treasurer/Secretary**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**
Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.
NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

